

Christian Friedrich David Schubart,  
La truto (2a traduko)

*tradukita de Ludwig Schödl*

*ŝanĝita traduko*

En riveret' malvarma,  
Ja en petola ag'  
Kaprica truto ĉarma  
Saltetis kiel sag'.  
Mi staris ĉe la bordo,  
Rigardis kun plezur'  
La fiŝon en akordo  
Kun rivereta pur'.

Malice kun intenco  
Ĉe l' bordo gvatis vir'  
Kun vergo, kun finenso  
La truton kun dezir'.  
Se l'akva kristaleco  
Nur restos, pensis mi,  
Al fiŝa libereco  
Atencus vane li.

Sed nun senpacience  
La akvon fiŝkaptont'  
Aĉigas jen intence,  
Kaj jam el ĝia ond'  
Trompitan truton tiras.  
Kaptita, ho karul',  
La koron vi disŝiras  
Amata, vi ĉarmul'!

.....  
.....,  
.....  
.....  
.....  
.....,  
.....  
.....

...

*Traduko de la Germana poemo “Die Forelle” de CHRISTIAN FRIEDRICH DAVID SCHUBART (\*1739-03-24 – †1791-10-10) en Esperanton de LUDWIG SCHÖDL (\*1909-10-31 – †1997-02-20).*

*Arg-832-1671 (2013-02-20 15:30:28)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis en tiu ĉi versio iom la duan kaj trian liniojn de la 3. strofo, kompare al la teksto en la kantlibreto, kiun verkis Ludwig Schödl, pro la ĝusta rimo „fiŝkaptont’ – ond“.*